Universala Esperanto-Asocio (en oficialaj rilatoj kun UN kaj Unesko)
**MondaFest' • La Monda Festivalo de Esperanto • 20 junio – 20 septembro**

# Festivala Kuriero

**14-a de oktobro 2020, numero 20**
Redaktas Dmitrij Ŝevĉenko kaj Anna Striganova





## Fernando Maia Jr., Vicprezidanto de UEA

En la 20-a de septembro, per la Printempa Inaŭguro, fermiĝis la Monda Festivalo de Esperanto (MondaFest' 2020); tamen de ĝi io daŭras: memoroj pri tio, kio pasis, lernoj pri tio, kio okazis; sed ankaŭ atendoj kaj ĉefe esperoj pri tio, kio venas nun. Kun tiu konscio prezentiĝas al ni la 20-a kaj lasta numero de la Festivala Kuriero, kaj tial la numeron konsistigas mesaĝoj de esperantistoj por la estonteco. La Festivala Kuriero servis al ni kiel peranto de tio, kion ni spertis en la Festivalo, kaj nun portas mesaĝojn de optimismo, kuraĝigo aŭ eĉ justa atentigo: al la Esperanto-komunumo; al la socio. La jaro 2020 estis okazo provi novajn alirojn en mondo, kiu tion petegis, en epoko, kiu tion postulis. Tial ni strebu, kuraĝe kaj espere, resti en daŭripoveco, ne nur inteligente, sed ankaŭ saĝe, ĉiam kun amo pri la naturo, pri la homaro, pri la planedo entute.

Vi povas esti aŭtoro de la revuo *Esperanto* kaj la Reta Revuo! Por kontribui, skribu al la redakcio *redakcio@revuoesperanto.org*

## Anna Striganova, Dima Ŝevĉenko

Tiu ĉi *Festivala Kuriero* estas la lasta en la festivala sezono, sed certe ne la lasta ĝenerale, ĉar la tradicio de MondaFest' ne finiĝis. Malgraŭ certaj defioj, la Universala Esperanto-Asocio kaj aliaj Esperanto-organizoj sukcesis unuece kontraŭstari la krizon, ofte laborante kaj kunlaborante eĉ multe pli fruktodone ol en la antaŭaj jaroj. Esperantistoj montris, ke la Esperanta movado estas daŭripova. Unu el la plej oftaj frazoj, ovrantaj tiun aŭ alian artikolon sonis pli malpli tiel: ĉi-jare nia tradicia aranĝo (pasinta virtuale) kolektis multe pli da homoj ol ordinare kaj el duoble pli da landoj. Virtualeco de la aranĝoj kaj etoso de reciproka tenera subteno en esperantistaro helpis viziti la renkontiĝojn al homoj kiuj pro sia sanstato, aĝo aŭ longeco de la distanco antaŭe ne povis viziti deziratajn renkontiĝojn. Nun la baroj falis. Kaj veninta por kelkaj monatoj neceso resti hejme donacis al multaj homoj eblon eklerni Esperanton. Rezulton de tio ni jam vidas kiam jen kaj jen aperas komunikemaj komencantoj, eklernintaj Esperanton dum kvaranteno, kaj ricevintajn eblon provi ĝin kaj ĝui ĝin kadre de MondaFest'.
Ni tre ĝojas daŭre kunlabori kun ĉiuj vi kadre de la Reta Revuo kaj la revuo *Esperanto*.

# Mesaĝoj de optimismo kaj kuraĝigo por la estonteco

## Manuela Burghelea

MondaFest' estis mirinda konektilo dum monatoj, kiu ŝparigis al multaj izoliĝon. Malgraŭ limigoj kaj elirblokadoj, kiuj aŭguris nenion bonan por nia vojaĝema kaj renkontiĝema komunumo, ĝi lerte turnis la paĝon. Tiu ĉi periodo alportis signifajn elprovojn al movado alkutimiĝinta al karaj kongresoj, kaj la movado nun ja montris ke ĝi kapablas renoviĝi kaj flori en ciferecaj medioj.

Gravas ke, per interreto, Esperanto-renkontiĝoj pli kaj pli tutmondiĝas. Nova generacio de parolantoj naskiĝas ankaŭ dum hejmizoliĝo. Mi ĝojas renkonti la novan Esperantujon, kaj dume dankas al la organizantoj por la okazigo de tiom buntaj diskutoj, prelegoj, muzikumado kaj virtuala vojaĝigo en ĉiujn mondopartojn.



## Heinz-Wilhelm Sprick

Pandemio > izoliĝo,
sen kunvenoj > nur frustriĝo!
Sed bonŝanc' – novaj ideoj
ekaperis! – Kiel feoj
virtuale nun ekflugis
retkolibroj! – Ne enuis:
ili flugis de IJK
al la SES, VEKI kaj VK,
ne maltrafis la kunvenojn
klubajn en London'. – Sidnejon
ankaŭ ili spektis ĝue.
Venis rete jam tre frue
gastoj el plej fora lando
al la "Ratkaptista Bando".
Dankon al Eventaservo,
kiu ja per pen' kaj vervo
helpis nun multajn aliajn
venki krizojn pandemiajn!



## François Lo Jacomo

En 2020, pandemio mergis nin en iun virtualan mondon, en kiu Esperanto riveliĝis aparte taŭga solvo por tutmonda problemo: per la virtuala kongreso kaj la nekutime ampleksa evento MondaFest' 2020, ni reale sukcesis kunsidi kun miloj da homoj el la tuta mondo, de okcidenta Ameriko ĝis orienta Azio. Mi fieras, ke mi povis alporti kontribuaĵon al tiu ĉi grava evento, kaj mi dankas kaj gratulas la organizantojn kaj ĉiujn aliajn partoprenantojn. Espereble multobliĝos similaj aranĝoj! Pli kaj pli grava montriĝos la neceso bone komuniki, t.e. ne trudi la propran opinion al la tuta mondo, sed priatenti la kulturan diversecon kaj la diferencojn de vidpunktoj kiel nemalhaveblan riĉecon de pli justa mondo. Kaj mi tre esperas, ke en tiu dezirata paŝo antaŭen al tutmonda paco, Esperanto ludos kernan rolon, kaj ke belan kontribuilon al tia tutmonda interkompreniĝo provizos la novaj teĥnologioj…



## Claude Nourmont

Mi estis feliĉa kontribui al MondaFest' en nova maniero. Kutime mi organizas la sesiojn de Kleriga Lundo por la UK. Defio estis adapti tion al specialaj cirkonstancoj. Fakte: ne adapti, sed krei novan manieron organizi la sesiojn.

Iuj prelegantoj skeptikis, kaj ankaŭ mi... Organizi interŝanĝajn prelegojn laŭ la baza spirito de Kleriga Lundo, ĉu vere? Sed ŝajne bone funkciis. Dum la reta prelego, estis ofte relative malgranda nombro da homoj, sed poste la prelego estis rigardita de cento(j) da homoj! Ankaŭ bone disvolviĝis la omaĝo al Julia Sigmond kaj Sen Rodin.

Restas en la programo de Kleriga Lundo ankoraŭ iuj sesioj en la venontaj semajnoj, i.a. pri literaturo. Bonvenon al ili!

Apartajn dankegojn al la gastigantoj kaj la teknikaj kunordigantoj, kiuj faris ĉion eblan por sukcesigi la programerojn.



## Ilia Dewi

Unue mi ege dankas al la organizantoj de MondaFest', la Esperanto-organizoj/asocioj, specife al UEA ( Universala Esperanto-Asocio). Mi povas ima-

ĝi kiel grandan laboron ĉiuj jam faris por sukcesigi la eventon.

Due, mi havis tre pozitivan opinion pri la okazo de MondaFest' rilate al la variaj programoj, kvanto de partoprenantoj kiuj venis el diversaj landoj, kaj la teknikaj rimedoj.

Pro tio mi esperas ke estontece UEA povos denove okazigi ĝin kun bone organizita teamo. Precipe, por mi kaj miaj samlandanoj, kiuj malofte povas fizike partopreni en la internaciaj aranĝoj. Ĉeesti en tia aranĝo virtuale kiel VK (Virtuala Kongreso) certe donas bonan sperton al tiuj, kiuj neniam povas partopreni en la Esperanto-kongreso pro diversaj kialoj, kaj alportas la senton de komuna solidareco, ĉar la esperantistoj, kiuj eble sentis sin izolitaj nun povas senti ke ili estas parto de "verda komunumo". Mi pensas ke per tiu evento MondaFest' la Esperanto-movado evoluas al pli modernaj manieroj, por ke ĝi efike atingu la celojn.

Fine, mi elkore gratulas al ni ĉiuj, ĉar la sukcesoj ne povas esti atingitaj sen bona kunlaboro.



## Vaskova Hanna

Karaj geamikoj tutmonde,

Mi salutas vin ĉiujn el Ĉeĥio kaj ĝojas ke ni partoprenis la VK en tiel granda nombro. Mi deziras al vi ĉiuj fortan sanon kaj esperon, ke la venontan UK ni partoprenos persone. Ĉion plej bonan al vi. Kaj specialan saluton al Henri Spehar/Helsinki 1995.



## Ikuko Kitagawa

Kia ŝoko estis kiam ni esperantistoj eksciis, ke la Universala Kongreso ne okazos ĉi-jare pro la pandemio! Tamen la subita decido pri la ideo de reta Monda Festo ĝojigis nin. Tio estis mirakla transformiĝo! Dank' al la Eventa Servo, ni kunvenis virtuale trans la landaj kaj kontinentaj limoj.

Kiel japano, mi povis partopreni diversajn kunvenojn en Aziaj landoj (Filipinoj, Koreio, Indonezio ktp.) aŭ Oceanio, krom la grandaj eventoj VK kaj VEKI. Mi konatiĝis kun novaj geamikoj tie kaj la amikeco inter malnovaj amikoj fortiĝis.

Kvankam la movado estis fizike dividita tutmonde kaj enlande, homoj, kiuj sentas sin izolitaj, akiris novan esperon kaj forton.

Ankaŭ ĉe ni en Japanio ni realigis hibridan Japanan Kongreson unuafoje en septembro (la 107-a Japana Esperanto-Kongreso en Nagoya, la 18-20-a de septembro). Tio multe dependis de la kapablo kaj klopodo de la LKK-anoj.

Ankaŭ por realigi la Mondan Feston, la organizantoj kredeble multe ŝvitis kaj sendorme laboris. Dank' al tia sindonema laboro, nia Esperantujo malfermis novan epokon, ĉu ne?

La kronvirusa pandemio detruis multe de nia bela kulturo, kio estas ege malĝoja por ĉiuj. Kaj ankoraŭ la pandemio daŭras. Tamen ni multe lernis de tiu katastrofo, kio montras, ke esperantistoj ĉiam havas flekseblan pensmanieron por esperiga estonteco.

Koregan dankon al ĉiuj organizantoj kaj laborantoj!



## Jezer Dorante

Kiam mi eklernis la lingvon en la jaro 2016, mia revo ĉiam estis iam partopreni en iu ajn Universala Kongreso de Esperanto. Mi pensadis: "Partopreni en UK estas belega sperto. Koni kaj interparoli kun aliaj geesperantistoj multe signifas por mi, ĉar tiele mi lernis pli pri la lingvo, kaj ankaŭ pri aliaj kulturoj". Tiel mi komencis mian vojaĝon tra Esperantujo, kaj iom post iom mi fariĝis pli kaj pli videbla en la Esperanta movado.

Ĉi-jare ĉiaj aktivaĵoj devis ŝanĝiĝi pro la pandemio. Tamen la strategio por disvastigi kaj realigi la ĉi-jaran kongreson estis ege taŭga kaj interesa meze de epoko, kie komunikadteknologioj kreskadas kaj fortiĝas. La ideo fari virtualan kongreson havis interesan flankon: ĝi alproksimigas la Kongreson al esperantistoj, kiuj eble ne povas pagi kotizojn aŭ vojaĝi eksterlanden.

Tio okazis al mi. Pro ekonomiaj kialoj mi ne povus vojaĝi eksterlanden por partopreni en iu ajn Universala Kongreso. Tamen, kiam UEA alproksimigis la Universalan Kongreson de Esperanto al la tuta mondo per interreto, mi sentis min feliĉa pro la ŝanco virtuale partopreni en mia unua Kongreso de Esperanto kadre de MondaFest' 2020.

Mi ne nur partoprenis kiel kongresano ĉi-jare. Kadre de MondaFest' 2020, UEA, TEJO kaj Kolombia Esperanto-Ligo (KEL) organizis la unuan kurson de Esperanto por hispanparolantoj, tute virtuale. En tiu kurso mi estis instruisto dum du monatoj kun gelernantoj el diversaj landoj de Latin-Ameriko kaj


Hispanio. Do, ĝi estis bela sperto kiu donis al mi novajn geamikojn, kaj ankaŭ permesis al mi varbi novajn homojn por nia verda komunumo.

De antaŭ pli ol unu jaro mi estas ege aktiva Esperanta jutubisto (www.youtube.com/jezer1329), kaj kadre de MondaFest' 2020 mi partoprenis en la Jutubista Rondo de la reta Internacia Junulara Kongreso (IJK-2020) kun jam spertaj jutubistoj kiel Katie kaj Alex Miller, ambaŭ el Usono. Ĝi estis bela sperto ĉar mi partoprenis kaj interparolis dum kelkaj minutoj pri diversaj temoj kun aliaj jutubistoj.

En la programo de la Virtuala Kongreso de Esperanto estis ankaŭ unu tago por la Oratora Konkurso (5-a de aŭgusto). Tie mi estis partoprenanto, kaj ĝuis la paroladon dum sep minutoj kun esperantistoj de diversaj partoj de la mondo pri diversaj kaj interesaj temoj.

Mi trovis interesa alian programeron de la Kongreso: la Virtualan Ekskurson. En tiu ekskurso mi havis la belan ŝancon montri Venezuelon al la tuta mondo, al la tuta esperantistaro. Mi dankas al Amri Wandel ke li kontaktis min kaj kuraĝigis min partopreni en la ekskurso. Mi konfesas ke ĝi estis la unua fojo kiam mi devis montri mian landon pere de virtuala ekskurso. Sed mi estas kontentega pro la rezulto de mia ĉiĉeronado, kaj pro la reagoj.

Mi gratulas al UEA, TEJO, landaj asocioj kaj al ĉiuj organizintoj, kiuj forte laboradis por realigi tiun ĉi Kongreson. Ĝi estas belega sperto, kaj mi rekomendas al ĉiuj esperantistoj sperti tian almenaŭ unufoje en sia vivo.



## Monika Molnar

Antaŭ ĉio mi ŝatus gratuli kaj danki pro la bunta, bele organizita kaj finmajstrita festivalo al la organizantoj kaj al la partoprenintoj! Ofte tiom abundis la samtempaj, interesaj prelegoj, ke mi sentis min kvazaŭ esti en iu UK, malkovranta la programtabelon en la Kongresa Libro kaj devigata elekti el la eroj. La avantaĝo ĉi tie estis la fakto, ke pli poste eblis spekti ankaŭ la maltrafitajn prelegojn. Brile! Do, ĉu pli bonas tiu ĉi formo kompare al la kutimaj UK-oj? Nu, por mi tamen ne. Kompreneble multaj aferoj estis bonaj, plaĉaj, eĉ tre praktikaj, tamen... Renkontiĝi kaj vive paroli, diskuti, amuziĝi kun miaj jamaj amikoj kaj akiri eĉ novaj, ne estas anstataŭigeble per virtuala kunveno. Jes ja, tiu ĉi socia flanko de la lingvo estas tre grava parto de (iu ajn) lingvoscio, kaj de tiu de Esperanto eble ankoraŭ pli. Pere de Esperanto ni iras al iu lando, al iu difinita loko por... por renkonti samtempe la tutan mondon. Dum tiu ĉi aranĝo ni aŭdis multajn interesajn prelegojn, sed ni estis solaj por aplaŭdi je la fino, ni trinkis nian kafon solaj kaj la etoso penis iom penetri nian animon dum niaj familianoj plurfoje alparolis nin en la hejma lingvo meze de nia elektita prelego... Nu... Tamen... Hmm... Ĉu eblus konservi nur la pozitivajn flankojn de tiu ĉi virtuala renkontiĝo? Jen la solvenda tasko.

Amike salutas vin ĉiujn<br>Monika, kiu sopiras je veraj,<br>sed sekuraj (!) renkontiĝoj



## So Jinsu

Kvankam kronvirusa pandemio kovras la mondon, malgraŭ sociala distanco, kontraŭ hejma vivo, ni esperantistoj amikegaj, solidarecaj transiris la grandan muron antaŭ ni per nova modo, virtualaj renkontiĝoj kun la nomo MondaFest' 2020 kaj Virtuala Kongreso tutan someran periodon. Tiel ni obstine agadas, kaj antaŭen iras ankaŭ hodiaŭ por morgaŭo.



## Zdravka Metz

Jes, mi tre ŝatas esprimi mian novan kaj agrablan sperton pri mia aktiva partopreno de la virtuala kongreso.

Dum la semajno inter la 1-a kaj 8-a de aŭgusto (kiam estus la UK en Montrealo – se...)

◦ Mi legis salutvortojn de la urbestrino de Montrealo

◦ Alian tagon mi partoprenis aŭtoran duonhoron pro mia ĵus presita nova libro de la rakontoj kun la titolo Birdoj en nia korto

◦ Tagon poste mi havis la honoron prezenti historian romanon de Louis Hémon - Maria Chapdelaine, tradukitan en Esperanton de Trefleo Mercier

◦ Mi rakontis pri la vojaĝo de Ludoviko Zamenhof al Ameriko pro la UK en Vaŝingtono, surbaze de la artikolo en la Brita Esperantisto de oktobro 1910.

Mi preparadis ĉiun mian prezentadon, sen scii kiel ĝuste ĉio okazos, ĉar mi neniam parolis al komputilo, sen havi reagon de la publiko.

Mi gratulas la skipon de teknika helpo, kien mi plusendis mian filmadon ekde mia domo semajnon antaŭ la evento.

Kiam estis la tempo antaŭ la ekkomenco de ĉiu programero, mi estis en kontakto kun la teknikisto. Estas li kiu trankvile, sen ekscito trankviligis min plene fida ke ĉio iros glate.

Estis tiel. Mi povis respekti la horaron; por aŭtora duonhoro estis la tempo por demandoj!

Tiu nekonata momento maltrankviligis min, sed okazis ekzakte tiel kiel la teknikisto informis min – la demandoj venos skribe kaj ke ĉiuj komprenu, estas mi kiu tralegos kaj respondos unu post la alia.

La duonhoro pasis rapide, same kiel aliaj du eroj pri kiuj mi respondecis.

Kompreneble mi spektis parton de tiu moderna evento, kiu kunigis pli ol la kutiman nombron de kongresanoj. Brave al tiuj kiuj havis la ideon, evoluigis ĝin, organizis kaj realigis.

Mi esperas ke la MondaFest' 2020 estis same interesa por la aliaj kiel por mi.

Gratulon al ĉiu kiu kunhelpis per iu ajn kontribuo ĉar, ja tri monatoj de renkontiĝado bezonis interesajn kaj diverstemajn kontribuaĵojn.



## Francisko Lorrain

Ni agu unuavice por la estonteco de nia biosfero – dum ni ankoraŭ povas ŝanĝi la direkton de ĝia nuna danĝerega evoluo. Esperanto estu portanto de tiu kvazaŭ lastminuta espero!



## Renato Corsetti

La ĵus pasinta jarcento estis unu el la plej sangoplenaj jarcentoj de la homa historio, plena je militoj mondaj kaj regionaj kaj tamen la parolantoj de la lingvo de paco, Esperanto, sukcesis pretervivi ĝin. Ĉi-jare okazis same drasta monda problemoparo: la kronviruso, kiu detruis la eblojn vojaĝi kaj renkontiĝi, kaj tamen unu plian fojon la parolantoj de Esperanto sukcesis travivi la problemon kaj eliri el ĝi pli fortaj ol antaŭe. Danke al inventemo kaj adaptiĝemo al la situacio la ĉi-jaraj kunvenoj vidis la partoprenon de pli da parolantoj de Esperanto ol la tradiciaj ĉeestaj kongresoj. La interŝanĝoj kaj debatoj estis pli viglaj kaj kun partopreno de homoj, kiuj neniam sukcesas vojaĝi internacie. Ĉi tio estas bona bazo por sukcesa estonteco de Esperanto kaj de la ideoj pri paco kaj justeco kunligitaj kun ĝi. Por tio, tamen, necesas reorientiĝi por ekspluati niajn retajn kapablojn por paroli al la mondo en la lingvoj de la mondo pri nia lingvo kaj pri niaj idealoj, por ke Zamenhof estu fiera pri ni.



## Orlando E. Raola

Karaj kunvojaĝantoj:

Ni fermas la longan someran festivalon kaj malfermas nian movadon kaj Esperantan agadon al la printempo, ne nur de la suda hemisfero, sed ankaŭ la printempo de nova komunikada erao. Mi vere sentas, ke la plej rimarkinda afero okazinta estas, ke la rimedoj kiujn ni utiligis por pluvivi kaj plu agadi dum la pandemio, jam ekzistis de pluraj jaroj, kaj malgraŭ la instigo kaj sopiro de multaj el ni, neniam ni sukcesis ilian profitan utiligon. Kaj tiam frapis nin la koronviruso kaj preskaŭ ŝajnis ke nia tuta mondo renversiĝos. Sed la kreemo, la obstino kaj konscia konfido de "nia diligenta kolegaro" sukcesis levi nin super la malfacilaĵojn, kaj finfine utiligi plene tiujn komunikrimedojn... Naskiĝis bela kaj nova maniero kongresi, prezenti literaturaĵojn, diskuti komitate, koncerti sole aŭ plurvoĉe kaj eĉ kunmanĝi! La vojo al tiu ĉi pinto ne estis ĉiam glata, kaj estis multe da detaloj en la ĉiutaga laboro kiuj postulis grandan fortostreĉon de la organizantoj kaj de la partoprenantoj. Sed feliĉe ni povas aserti, ke ni sukcesis, kaj ke la estontaj historiistoj nepre devos verki detale kaj sincere laŭde pri la mirakloj okazintaj en la jaro 2020. Denove dankon al vi ĉiuj kaj ĝis revido survoje al novaj aventuroj.



## Paulo Sergio Viana

Ni ne scias, kiel sufiĉe danki!

La Esperanta kulturo naskiĝis kaj elvolviĝas sub la devizo "Venki barojn": obstino kaj pacienco troviĝas en nia Zamenhofa tradicio.

Kaj jen alvenis terura viruso kaj konsterna pandemio, kaj ĉio aspektis kvazaŭ terora atako kontraŭ nia Esperanto-eventa kalendaro. Ne plu la Universala Kongreso en Montrealo, ne plu la tradicia jarmeza sinsekvo da viglaj eventoj!

Kaj tamen! Preskaŭ mirakle, elsaltis el tiu scenejo de katastrofo ia neatendita, neimagebla lumo: MondaFest' 2020!

Per ĝi niaj disaj eventoj ĉeestaj, ofte kun nemultaj partoprenantoj, transformiĝis en mirindan sinsekvon da virtualaj grandiozaj renkontiĝoj. Ne nur renaskiĝis la sezonaj eventoj, sed ili krome fariĝis pli riĉaj, pli tutmondaj, pli demokratie alireblaj. Vera revolucio en la uzado de nia lingvo, kun la eblo, ke ordinaraj esperantistoj aktive demandu, diskutu, esprimu sin el ĉiuj kontinentoj.

Por tia neatendita mirindaĵo, oni konsciu, ke necesis grandega investo de kreemo, energio kaj kompetenteco. Teknologiistoj kaj estraranoj kunlaboris saĝe kaj intense, por kontentigo de tuta komunumo de homoj, kiuj kredas pri la lingva justeco en nia mondo.

Kaj ĉio funkciis glate, kontentige, feliĉige! Ŝajne, malfermiĝis tute nova vojo por la Internacia Lingvo kaj ĝiaj uzantoj. Nia verda mondo neniam plu estos la sama.

Ni, ordinaraj esperantistoj, ne scias, kiel sufiĉe verve danki al la estraro de Universala Esperanto-Asocio kaj al la laborgrupo de teknikistoj, kiuj ebligis tian neforgeseblan sezonon!



## Normando Fleury

Mi ne estas solula esperantisto, ĉar mia edzino parolas Esperanton, do, temas pri nia hejma lingvo ĉiutaga. Tamen, por mi Esperanto estas pli ol tio, ĝi estas eblo renkontiĝi, konatiĝi kaj amikiĝi kun homoj el la tuta mondo.

Kiel prezidanto de la LKK por la 105-a UK en Montrealo, mi multege bedaŭris ke la kongreso ne povis okazi. Sed jen, okazis MondaFest' kun multege pli longa daŭro ol kutima UK. Mi povis lerni, sperti, babili, kontribui, ridi ktp. dum MondaFest'. Por mi, ĝi estis valora sperto, ĉar mi sentis min parto de io mondskala.

La Esperanto-movado sukcesis pruvi ke ĝi povas rapide adaptiĝi kiam necesas. Dankegon al ĉiuj, kiuj helpis tiun atingon.



## Flo, Prezidanto de EUROKKA

Karaj organizantoj kaj partoprenantoj al MondaFest' 2020, Esperanto-muziko faris parton de ĉi tiu MondaFest' 2020, kaj mi ĝojis ke Esperanto-muziko trovas sian lokon en tiu granda virtuala evento. Esperanto-artistoj faris grandajn klopodojn kaj adaptiĝis al tiu nova maniero prezentiĝi al la publiko tutmonde.

Esperanto-muziko estas grava parto de la Esperanta vivanta kulturo kaj ĝi meritas vian tutan atenton kaj subtenon por ke ĝi kresku, ampleksiĝu kaj plu diversiĝu...

Aŭskultu kaj malkovru la novajn verkojn de novaj Esperanto-artistoj kaj de la jam famkonataj... Estu atentaj pri la muziknovaĵoj, kiuj abundas dum la tuta jaro...

Senlime vi diskonigu ilin...
Esperanto-muziko akompanos kaj ĝojigos vin...
Ĝi bezonas vin, same kiel vi bezonas ĝin...
Dankegon pro via aktiva subteno.
Vivu Esperanto-muziko !
Plej muziksalute!



## Anjo Amika

Por mi la Monda Festivalo/MondaFest' 2020 donis multajn pozitivajn impresojn.

Ĉu temas pri altnivelaj prelegoj, ĉu pri muzikaj kontribuoj.

La virtualaj renkontiĝoj ebligis kontaktojn kun esperantistoj, ankaŭ el la aliaj kontinentoj.

Estus inde ankaŭ en la estonteco organizi MondaFest'.



## James Rezende Piton

En momento kiam iuj registaroj atakas kaj malsubtenas la plej reprezentajn instancojn de la internacia UN-Sistemo, UEA devas daŭre reemfazi sian subtenon al la valoroj, kiujn gardas Unuiĝintaj Nacioj. Ne eblas esti esperantisto, alpreni per tio starpunkton de internaciemo kaj silente konsenti pri la subfoso de instancoj, kiuj signifas veran "rondan tablon" inter la landoj. Oni pledu por reformoj, sed forĵeti la organizojn probable okazus kunlige kun neglekto de universalaj valoroj kaj rajtoj.

MondaFest' donis al ni la okazon sperti tiun internaciemon kaj ĝia bunteco venis en tre taŭga momento, pro sinsekvaj grizaj nuboj tra la mondo. Gratulon al ĉiu, kiu kontribuis al MondaFest' kaj estu ĝia bunteco konstanta!



## Lydia Lindla

Mi esperantistiĝis en 1957. Mi plene konsentas kun la vortoj de s-ro Fernando Maia, ke la okazigo de la Monda Festivalo de Esperanto kaj de la Virtuala Kongreso estis pli ol simpla kompenso de la nuligo de la 105-a Universala Kongreso (UK). Mi elkore ĝojiĝis pri la virtualaj kunvenoj, prelegoj kaj babilejoj.

Profunde impresis min la parolado de la Honora Prezidanto de UEA Humphrey Tonkin pri la historio de Unuiĝintaj Nacioj kaj pri Monda Festivalo 2020. Tre plaĉas al mi la emblemo de MondaFest' 2020, havanta kvinpetalan floron.

La belsona, vere internacia lingvo Esperanto estis kaj restos mia fidela kunvojaĝanto ankaŭ dum la tutmonda pandemio. Ni kuraĝe partoprenu en la venontaj virtualaj kunvenoj kaj festivaloj, kiujn organizos UEA.

Koran dankon al la tuta teamo de UEA, al ĉiuj organizantoj kaj volontuloj, kiuj donis al la esperantistaro tiel interesajn tagojn virtuale.



## Fernando Andres Paredes

Karaj gesamideanoj, mi elkore kaj sincere gratulas vin pro viaj klopodoj pri la daŭra prezento de la Festivala Kuriero antaŭ la Esperantista Mondo. Tio signifas ke malgraŭ la pandemio, nia Esperanta komunumo daŭrigas unuigita kaj forta per nedetrueblaj ligiloj.

Miaj bondeziroj pri sano kaj novaj sukcesoj el la malproksima Kubo.



## Mulele Mbassa

Indas dankesprimi al UEA, kiu montris demokration decide alvoki kunlaboran verkadon, ke Esperanto-lingvo fariĝu laboro de ĉiaj esperantistoj por aperigi ĝin en la lasta informilo de la MondaFest'-kuriero 2020. La verkoj de multaj esperantistoj por la lasta numero de Monda festo ne nur kontribuos per informoj el pluraj lokoj, sed ankaŭ ellevas talentajn verkistojn en Esperantujo.

Ni ĉiuj komprenas ke la okazigo de la Virtuala Kongreso de Esperanto estas kaŭzita de la pandemio, kiu bremsis preskaŭ ĉiun funkcion de la homa vivo! Danke al teknologio, kiu donis/as eblon al ni renkontiĝi kvankam ne kuntuŝon per manpremoj de unu al la aliaj, tamen duonfizike! Tia renkontiĝo donas avantaĝon por ŝpari monon vojaĝi al la kongresa urbo, ankaŭ donis eblon partopreni la Virtualan Kongreson al homoj kun manko de sufiĉa rimedo.

Gratulindaj estas la organizantoj, kiuj eluzis sian tempon energie labori pri tia ĝuinda kaj sukcesa monda festo!




## Nazi Solat

Oni diras: la historio dividiĝos al du gravaj sekcioj: antaŭ la kronviruso kaj post kronviruso.

Laŭ mi ankaŭ Esperantujo dividiĝus same!

Esperantujo sukcesis, kunordigite kun tuta mondo, lavi sian manon kaj daŭrigi sian vivon imune, sane, eĉ pli riĉe!

VK agis kiel nia referenca ekrano por paroli, muzikumi, esprimi niajn ideojn sen artefaritaj, politikaj aŭ religiaj limoj. Multaj tra la mondo, kiuj pro diversaj kialoj ne havis eblojn partopreni la UK-on, dank' al la VK, trovis eblon ĝui ĝian etoson.



## Mikaelo Bronŝtejn

La kronvirusa pandemio estas terura kaj neatendita defio por la mondo kaj aparte por la Esperanto-komunumo.

Mi supozas, ke pere de la nuntempaj teknikaj ebloj kaj dank' al la eksterordinara laboro de sindonemaj samideanoj la vivo de esperantistoj en 2020 estis ne malpli eventoplena ol en la antaŭaj jaroj. Sed tamen mi restas kun espero pri malvirtualaj Esperanto-renkontoj en 2021.




## Okuuxaki Tosxiomi

En 2023 ni celebru la 100-jaran jubileon de la fondiĝo de Esperanto-Populariga Asocio!



## Jean Pierre Vanden Daele

Mi kore gratulas la organizantojn kaj kunlaborantojn.



## Carlo Minnaja

MondaFest' estis grandioza gratulinda realigo, kaj estus dezirinde, ke ĝi laŭeble ripetiĝu, sendepende de, aŭ flanke al, ordinaraj kongresoj, kiuj ebligas ankaŭ la fizikan apudecon. Esperanto kaj la ideo de paco kaj kunlaboro inter personoj de bona volo ne estas ekskluziveco aŭ monopolo de UEA, sed spirita propraĵo de ĉiuj, tial ĉiutendencaj grupoj estu egale bonvene partoprenaj al ĉi tiuj tutmondaj festoj.



## Nikhil Kizhakkedath

Mi estas Nikhil el Barato. Jen mia mesaĝo al la legantoj:

La mondo bezonas pacon. La mondo bezonas grandan amikaron de mondcivitanoj. Ĉiuj esperantistoj klopodu plibonigi siajn socion kaj medion pere de iu paca agado. Bonvole ekkonigu nian lingvon al viaj familianoj kaj geamikoj. Estu paca batalanto!



## Ruben Sanchez

Karaj komunumanoj, nun (la 30-an de septembro 2020) ni trapasas kelkajn malfacilaĵojn.

Sendube, tiuj malbonaĵoj ne daŭros por ĉiam.

Venos pli bonaj momentoj por renkonti nin ĉiujn.

Kaj nia kara lingvo akompanos nin en tiu ĉi "nova normaleco".



## Leandro Abrahão

La pandemia periodo resignifadas la vorton "kune". Pli ol iam ni estis kune, kune en la timo morti, kune en la deziro vivi. Tamen, ankaŭ kune per Esperanto, kaj sekve por ĝi. Festivalis alireblo, esperantistoj vid-alvide, efektive, danke al la reto. Esperantujo estu ia eterna festivalo... pli unueca, malpli unuforma.



## Amarílio Carvalho-Brazilo

Ege aplaŭdinda laboro de UEA.
Elkoran gratulon!



## Jean-Claude Roy

Mi sentas min tre dankema pro tiu brila MondaFest' kaj specife pro la riĉa programo kaj enhavo de la VK.

Tamen mi havas etan konsilon kaj bedaŭreton.

Ekster nia movado ni ne estis pretaj por informi la amaskomunikilojn pri tiu evento de MondaFest' kaj pri nia rolo por UN75.

Aliflanke ni ĉiuj konsciu pri la lingva riĉeco de Esperanto. Legante ĉiutage en Esperanto mi miras pri la beleco, taŭgeco kaj graveco rilate edukadon de junuloj.

Kiel trafe diris Claude Piron, Esperanto estas «eduka juvelo». Temas pri la lingvo mem ege riĉa kaj pri la interna ideo, pri la historio de la movado ktp.

Do kiel ekzemple nia amikino Penelope Vos, kiu revas pri eliro de Esperanto el Esperantujo kaj eniro en lernejojn, ankaŭ mi revas pri eniro de Esperanto en lernejojn.

Tio estu nia ĉefa celo de ĉiuj esperantistoj kaj ne nur de ILEI, kvankam kompreneble mi subtenas la prezidantinon de ILEI, kies mesaĝoj gravegas (kaj la lastaj bonegaj pensoj de Mirejo estas en la lasta revuo Esperanto).

Do ni strebu antaŭen per enkonduko de Esperanto en lernejojn. Estas miaj deziro kaj celo!

Gratulegojn pro MondaFest' kaj mi esperas vin renkonti en Belfasto.

Plej amike kaj samideane.



## Guadalupe Vega

Miaj karaj geamikoj: Mi gratulas vin, pro la Festivalaj Kurieroj, ili estis ege interesaj kaj vi feliĉigis min. Do, dankon, kaj ricevu fortan ĉirkaŭbrakon el Meksiko.



## Ahmad Mamdoohi

Dum sennombraj programeroj de MondaFest' 2020, mi deziregis kunspekti la okazaĵon kun ĉiuj miaj konatoj, kiuj ne tiel kredemas kaj/aŭ kredivas pri realigeblo de la ideoj kaj la idealo de Esperanto. Ĉar kaj la etoso kaj la programeroj tiel ekstazigis min, ke mi emis kredi ili faras la samon kun kiu ajn alia persono!

Mi similigus la MondaFest' al pinto de altega monto, malantaŭ kiu atendas nin la Fina Venk': ekpost la Festo mi vere sentas, ke ni jam trapasis la alsupran kaj energi-petan parton de la itinero, kaj nun ni trovas nin en la descenda deklivo, kies traïron, eĉ se ni volus ĝin haltigi, ni ne povus – pro la laŭa dors-vento kaj la jama inerto-forto!



## Federico Gobbo

En la nuna tempo, nur unu certeco estas: ke ne estas certecoj. Jen tempo por ŝanĝoj kaj ŝanĝiĝoj: kia oportuno!



## Joel Muhire

La VK donis pli da spertoj al mi. Estis mirinde por mi vidkunveni rekte kun homoj kiuj estas je miloj da kilometroj. Danke al MondaFest' mi scias ke tre facilas retkunveni sen tro da malŝparo.



## Małgosia Komarnicka

La vorto FESTIVALO estas por mi speciale grava, ĉar ĝi kuniĝas kun la Eŭropa Festivalo de Esperantaj Kantoj. Tiun festivalon mi kun grupo de miaj amikoj (ĉefe neesperantistoj) organizas jam de 8 jaroj. Preparado de tiu festivalo postulas grandegan laboron, sed donas ankaŭ grandegan kontentecon kaj ĝojon. Tiel do, la vorto *festivalo* elvokas ĉe mi samajn agrablajn sentojn. La samajn sentojn elvokas penso pri MondaFest'2020. Ĝi belege montris, ke ni estas unueca amika familio! Ke ni sentas nin gefratoj! La Monda Festivalo de Esperanto estis belege preparita kun perfekta organizo. Ni havis eblecon partopreni en bonega programo kun gravaj seriozaj spertinterŝanĝaj prelegoj, konversacioj, filmoj, muzikoj kaj eĉ kun ekskursoj… MondaFest'2020 estis la plej bela UK en kiu mi partoprenis. Gratulojn!

Al mi estas malfacile trovi kaj nomi ion, kio povus plimalgrandigi la sukcesplenan aranĝon. Kaj mi denove gratulas!

Pri UEA … Ĝi certe ludas gravan rolon en nia E-movado, sed … sed nun ni festu sukcesplenan Mondan Festivalon de Esperanto. Certe ĉijara Monda Festivalo de Esperanto montris, ke UEA "reviviĝas", ke ĝi havas"freŝan forton" kaj novajn ideojn kaj proponojn. Mi do kun espero kaj ankaŭ kun ĝojo rigardas estontecon de nia E-movado.

La vorto ESPERANTO elvokas vere belegan senton, ĉar Esperanto estas lingvo de Esperantujo, la plej ĉarma lando en la mondo. Esperanto tre ŝanĝis mian vivon kaj mi certe tial rimarkas en Ĝi nur avantaĝojn. Mia vivo dank' al Ĝi gajnis multe pli vastajn perspektivojn. Mi ellernis, ke en la tempo de kulto de mono kaj falo de aŭtoritatoj, oni povas realigi belajn valorojn kaj servi al aliuloj anstataŭ plenumi nur siajn proprajn bezonojn. Mi certiĝis, ke bono kaj honesto ne estas forgesitaj ecoj. Mi ekkonis multajn grandiozajn personojn kun nekutima forto de volo, sinofero kaj determino.




**Internacia Kongresa Universitato.**
**Tutmonde. 73-a sesio. 01 — 08 de aŭgusto 2020.**

Ĉi-jare la unuan fojon IKU-libro estas elŝutebla senpage jam komence de la Virtuala Kongreso de Esperanto:
http://iku.trovu.com/
La kunredaktoroj kaj eldonejo rifuzis de ajna rekompenco de ilia laboro pri la IKU-libro. Vi povas donaci, omaĝe al tiu ĉi eldono, al la Ĝenerala Kaso de Universala Esperanto-Asocio:
https://mallonge.net/7f

*Dankon al Rob Moerbeek, kiu helpis provlegi tiun ĉi numeron*